

**NSiR - Nova Sento in Rete
N. 1007 (21/2019)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet
<http://iej.esperanto.it>

Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR
I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

LIBRERIA

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

feilibri@esperanto.it

INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

IL 5 PER MILLE ALLA FEI

Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi,
realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- Internacia Festivalo pri poezio	2
- Promenado tra la urbocentro de Ĝenovo	3
- Chrome kaj Firefox	3
- UEA kongresos en Belfasto, Nord-Irlando, en 2021	4
- Pillole di Salvezza 1007: Anna Frank	4

INTERNACIA FESTIVALO PRI POEZIO "VORTOJ DISMALFERMITAJ" "ESPERANTO KAJ ROMANTIKA POEZIO" LA 8AN KAJ 9AN DE JUNIO 2019

Lastatempe Ĝenovo gastigas plurajn esperantajn eventojn. Post la sukcesa februara evento ĉe la muzeo de De André kun Grazia Barboni Carniani kaj la maja ekskurso tra la malnova urbocentro, la 8-an kaj la 9-an de Junio la ĝenovanoj kaj la lokaj esperantistoj povis aŭskulti la poemojn de K. Kalocsay tradukitajn de la verkistino Anna Maria Dall'Olio kadre de la Internacia Festivalo pri Poezio. Krom la prezento de la poemoj, estis dum du tagoj tablo kie eblis aĉeti esperantajn librojn de FEI, poeziajn katalogojn kaj verkojn de Anna Maria Dall'Olio: "Sì shabby chic" kaj "Tabelo".

Itala Esperanta Federacio, Ĝenova Esperanto-Klubo kaj la respondeculoj de la Doĝa Palaco kune kunlaboris por doni eblon prezenti verkojn en nia lingvo. Pluraj urbanoj kaj turistoj alproksimiĝis kaj peti informojn pri la lingvo kaj pri nia loka asocio. Dum la evento, la esperantistoj Cristina Balzarini, Patrick Morando kaj Anna Maria Dall'Olio sukcesis vendi dekon da libroj, fakte la duonon de la tuta stoko (120,50 E) kaj montri ke Esperanto ne nur estas lingvo "artefarita" sed ankaŭ kulturo.

La samideanino Cristina Balzarini okupiĝis pri pluraj administraĵoj: rilatoj kun la respondeculoj de la Doĝa Palaco kaj FEI, akcepto de la verkistino je la 11.40 ĉe la stacidomo Genova Brignole, akompano al la hotelo. Ni ĉiuj rendevuis je la 15.30 en la granda teretaĝa salono kie ni starigis esperantan tablon meze de aliaj eldonejoj.

Je la 18.00 ĝis la 18.30 Anna Mara Dall'Olio prelegis pri K. Kalocsay, legis siajn tradukojn el esperanto kaj ankaŭ deklamis siajn proprajn verkojn. La publiko kaj la respondeculoj de la evento aŭskultis kun intereso kaj starigis demandojn pri la lingvo, ĝia historio kaj pri la nuntempa rolo de esperanto en la mondo.

La 9-an de Junio esperantistoj de Chiavari venis al la evento por subteno: Elisabetta Vilisics Formaggio kun du aliaj samideaninoj. La antaŭan tagon vizitis nin Ferruccio Masnata de la "Circolo Esperantista Genovese". Ni longe parolis pri projektoj kaj daŭra kunlaboro. Julie "Genova Esperanto-Klubo" kaj "Circolo Esperantista Genovese" pruntedonos centojn da esperantaj libroj al la publika loka biblioteko por ke la urbanoj kaj la lernantoj prunteprenu ilin senkoste.



PROMENADO TRA LA URBOCENTRO DE ĜENOVO

La 12-an de Majo 23 esperantistoj venis al Ĝenovo por partopreni la tuttagan ekskurson kaj por viziti la malnovan urbocentron. Je la 10.30 "verduloj" de Milano, Torino, Vercelli, Biella, Savona, Chiavari kaj Latina renduevis ĉe la stacidomo Genova Piazza Principe kun la ĝenovaj samideanoj. Post mallonga kafaŭz la tuta grupo laŭiris Strato Balbi kaj atingis la barokstilan bazilikon "De la Annunziata" kaj admiris ĝian imponan belecon. Apud la baziliko la esperantistoj haltis kaj vizitis la muzeon de Fabrizio De André kaj la apudaj mezepokaj turo kaj pordo "Porta di Vacca". Tute proksime eblis foti kaj rakonti pri la historio de alia barokstila baziliko, tio estas la Baziliko de "San Siro". Tie lernantino Daniela Buscaglia rakontis esperante pri la legendo de la baziliko kiu karakterizas tiun preĝejon. Post la rakonto, la esperantistoj ĝuis la renesancajn palacojn de Strato Garibaldi, unu el la plej belaj stratoj de Eŭropo. La palacoj de tiu strato estas enskribitaj en la listo de mondheredaĵoj de UNESCO ekde 2006. Pluirante, la grupo atingis la grandan fontanon de Placo "De Ferrari", la Doĝan Palacon, la Operejon "Carlo Felice", la domon de Kristoforo Kolumbo kaj la duan mezepokan pordon de la urbo, nome "Porta Soprana". Aliaj interesaj vidindaĵoj, kiuj la samideanoj povis admiru estis la Katedralo de Sankta Laŭrenco kaj la Baziliko "Del Gesù" kiu entenas pentraĵon, la "Cirkumcido", de la fama pentristo Pieter Paul Rubens. Dum la lunĉo, frititaj anĉovoj, ĝenova "focaccia" kaj aliaj lokaj frandaĵoj tiklis la guston de la esperantistoj ĉe la malnova haveno, "Porto Antico", apud la Granda Akvario. Inter unu anĉovo kaj peco da "focaccia" la liguriaj lernantoj ricevis siajn finstudajn atestilojn kaj iuj partoprenantoj aĉetis la tutnovan diskon de Chiara Raggi titolitan "Blua Horizonte". La lasta etapo kaj halto estis "Spianata Castelletto" kie eblis admiru la panoramon de la urbo, gustumi glaciaĵojn kaj fari komunan foton antaŭ ol iri al la stacidomo por la ĝisrevidoj. La ekskurso estis sukcesa!



Chrome dà le traduzioni dei suoi messaggi in molte lingue a scelta. Fra queste c'è anche l'esperanto. Viene usato un traduttore automatico, la cui qualità è migliorata con l'andare del tempo. Google translator traduce abbastanza bene da e per Esperanto. La stessa cosa si può ottenere anche con Firefox, usando un plugin di traduzione come *S3 Translator*.

UEA KONGRESOS EN BELFASTO, NORD-IRLANDO, EN 2021

Por la 106-a Universala Kongreso, post du jaroj, la Estraro de UEA elektis la "smeraldan insulon", Irlando, kiel kongreslandon. La Universala Kongreso la unuan fojon okazos en tiu parto de Eŭropo. La gastiga urbo estos Belfasto, la ĉefurbo de Nord-Irlando. Grava haveno kaj pordo al la belega nord-irlanda marbordo, Belfasto suferis dum la lasta jarcento pro armita politika konflikto, sed nun estas konsiderata kiel unu el la plej sekuraj urboj en la brita insularo. Konante la malmultecon de la lokaj movadaj fortoj, UEA traktis rekte kun la urbo pri la kondiĉoj de la invito kaj ricevis tre favoran oferton de kongresejo en Queen's University (la Reĝina Universitato). La loka grupo en Belfasto jam donis plurajn praktikajn konsilojn pri la organizado kaj esprimis sian pretecon helpi pri ĉiuspecaj lokaj aferoj. "Belfasto ja estas surpriza, sed bonega interesa elekto", ili komentis. Ankaŭ Joy Davies, la sekretario de Esperanto-Asocio de Irlando, mesaĝis pri sia subteno: "En Irlando estas nun malmultaj organizitaj esperantistoj, sed ni bonvenigas la kongreson kaj certe helpos, kiom ni povos. Ni esperas, ke ĝi allogos novajn lernantojn, parolantojn kaj apogantojn de la lingvo al nia asocio". D-ro Séan O'Riain, irlanda diplomato, kiu aktivas interalie en Eŭropa Esperanto-Unio, komentis: "Mia unua reago estas forte pozitiva. Komprenoble mi ĉion faros por antaŭenigi la kongreson". El Britio D-ro Geoffrey Greatrex reagis kun simila entuziasmo: "Kiel antaŭa prezidanto de EAB, mi tre fieras kaj kontentas pri la planata UK en Nord-Irlando, la unua en la irlanda insulo kaj pli ol 30 jarojn post la lasta UK en la brita insularo". La 106-a UK estas planata por okazi de la 17-a ĝis 24-a de julio. Dume, se vi ankoraŭ ne aliĝis al la 104-a UK, kiu okazos en Lahtio, Finnlando, de la 20-a ĝis la 27-a de julio 2019, konsi! deru tion fari pere de nia reta aliĝilo ĝis la **15-a de junio**: <<https://uea.org/kongresoj/alighilo>> (post tiu dato bv. aliĝi rekte surloke en la kongresejo).

PILLOLE DI SALVEZZA 1007: ANNE FRANK

Il 12 giugno è l'anniversario della nascita (nel 1929) della giovane tedesca di origine ebraica Annelies Marie Frank, conosciuta come Anne Frank (in Italia, Anna Frank); <it.wikipedia.org/wiki/Anna_Frank>; della sua data di morte si conosce con precisione soltanto l'anno, 1945, perché, rifugiatasi con la famiglia ad Amsterdam e divenuta apolide, durante l'occupazione tedesca dei Paesi Bassi fu arrestata per una delazione anonima, e deportata nel campo di concentramento di Bergen-Belsen, dove trovò la morte nel febbraio o marzo 1945 (sul francobollo in sua memoria emesso dalla Repubblica Federale di Germania nel 1979 è scritto "31 marzo 1945", ultima data possibile). Anne Frank è famosa per un "Diario" ("Het Dagboek van Anne Frank"), che scrisse nei due anni in cui, per sfuggire ai nazisti, era nascosta con la famiglia ad Amsterdam in una cosiddetta "casa retrostante" (Achterhuis in olandese) in Prinsengracht 263, una costruzione situata dietro un edificio principale, e quindi in grado di essere meno notata. Il libro è stato tradotto in moltissime lingue (in Esperanto, due volte: v. sotto), ed è diventato il simbolo della Shoah. Trascriviamo, con traduzione in italiano, parte della recensione (di un

russo emigrato negli Stati Uniti) della più recente delle due versioni in Esperanto, ed alleghiamo il francobollo tedesco del 1979 in memoria di Anne Frank.

LA PLEJ FAMA TAGLIBRO

Tiu ĉi libro estas ligita kun ĉeno da mirakloj. Ĝin verkis dum du jaroj en kaŝejo sub konstanta minaco de aresto juda knabino el Nederlando. Ĝi aperis ĉiulande kaj ĉiulingve, eĉ en Sovetio, kiu sisteme prisilentis suferojn de la juda popolo dum la dua mondmilito. Unu el la fruaj tradukoj estis tiu en Esperanto de Degenkamp. La nunan, pli ampleksan, tradukon faris Nora Bartels, kiu, pro sia blindeco, devis manipuli ne nur la nederlandan kaj esperantan, sed ankaŭ brajlajn variantojn de la teksto. Kaj fine la libron eldonis mirinde bele kaj zorge la japana eldonejo Libroteko Tokio. Eble, ne ĉiuj legis tiun verkon, sed evidente ĉiuj scias, ke temas pri sincera taglibro verkita dum la germana okupado; taglibro verkita de ĉarma knabino, kiu ne estis anĝelo, sed reala knabino kun siaj justaj kaj maljustaj juĝoj, kun siaj amoj kaj malamoj – knabino, kiu estis transformiĝanta en virinon kaj kiu estis pereigita en faŝista koncentrejo. Same estis pereigitaj ĉiuj infanoj de Ludoviko Zamenhof. Same estis pereigitaj ses milionoj da aliaj homoj. Ilia sola “kulpo” estis aparteno al la juda nacio. Estas nekredeble, ke tio okazis en la “civilizita” Eŭropo en la “civilizita” 20a jarcento. Niaj posteuloj apenaŭ povos imagi kaj kompreni tiun barbarecon. Kontraŭhomaj reĝimoj kaj iliaj subtenantoj ne malaperis. La taglibro de la knabino el Nederlando estas ne nur tre interesa legaĵo, sed ĝi ankaŭ restas memorigo pri la minaco, kiu plu pendas super nia planedo.

Boris Kolker, “Monato”, 1998-2, p. 16

IL DIARIO PIÙ FAMOSO

Questo libro è legato a una serie di miracoli. Lo scrisse per due anni in un nascondiglio sotto la costante minaccia di arresto una ragazza ebrea dell’Olanda. È apparso in tutti i Paesi e in tutte le lingue, perfino in URSS, che sistematicamente passava sotto silenzio le sofferenze del popolo ebreo durante la seconda guerra mondiale. Una delle prime traduzioni fu quella in Esperanto di Degenkamp. L’attuale traduzione, più ampia, è stata fatta da Nora Bartels, la quale, a causa della sua cecità, ha dovuto maneggiare non solo il testo in olandese e in Esperanto, ma anche la variante in braille. E infine, il libro è stato edito in modo mirabile ed accurato dalla editrice giapponese “Libroteko” di Tokio. Forse, non tutti hanno letto quest’opera, ma ovviamente tutti sanno che si tratta di un diario sincero, scritto durante l’occupazione tedesca; un diario scritto da una graziosa ragazzina, che non era un angelo, ma una ragazza reale, con i suoi giudizi giusti e ingiusti, con i suoi amori e i suoi odi, – una ragazzina, che stava trasformandosi in donna e che fu uccisa in un campo di concentramento fascista. Allo stesso modo furono uccisi tutti i figli di Ludovico Zamenhof. Allo stesso modo furono uccisi sei milioni di altre persone. La loro unica “colpa” era l’appartenenza alla nazione ebraica. È incredibile che questo

sia accaduto nella "civile" Europa e nel "civile" 20° secolo. I nostri posteri potranno a stento immaginare e capire questa barbarie. Regimi disumani e loro sostenitori non sono scomparsi. Il diario della ragazzina dei Paesi Bassi non è solo una lettura interessante, è anche un monito della minaccia che tuttora incombe sul nostro pianeta.

Boris Kolker, "Monato", 1998-2, p. 16

Tradukoj al Esperanto – Traduzioni in Esperanto–

"Taglibro: (la postdomo) de Anne Frank". trad. G. J. (Gijsbertus Johannes) Degenkamp, Scheveningen, Heroldo de Esperanto, 1959. – 219 p.

"Taglibro de Anne Frank", trad. Nora Bartels, Libroteko, Tokio, 1997. 299 p.

